

POEMOJ

Nia marŝo

V. Majakovskij

Tondru tra placoj ribela bruo !
Supren de l' kapoj ardaĵ la kurvo !
Ni per inundo de l' dua diluvo
Tralavas la mondon de l' urboj.
La tempo rampas nur,
Malviglas la jara ĉar !
Koro--jen nia tambur !
Kuro--jen nia ard !
Ĉu nian ĉielon egalas io ?
Ĉu kuglo nian koron enkroĉu ?
Niaj kantoj--niaj armiloj.
Nia oro--sonoraj voĉoj.
Kampo per verda reflekto
Sternu la tagan valon.
La ĉielarko spektra
Sparku la flugĉevalojn.
Vidu :--stelar' en nebulo.
Sen ĝi ni la kantojn semas.
Hej, Granda Ursino, postulu,
Ke oni ĉielen nin prenu !
Mondo--jen inda ej' ! Ĝoj' !
Vejnojn inundas printemp'.

Koro al bato plej'! Voj'
Trilas per kupra trem'

La poeto laboristo

La poeton oni alkrias :
„Se vi vidus vin ĉe l' tornilo modesta!“
Kaj la versoj ja
estas nenio!
Labori vere—krevus viaj intestoj.
Povas esti—
 pli ol iu,
 okup'
la mia al la laboro
parenkas.
Mi ja ankaŭ estas uzin'
kvankam sen fuma tub',
kaj pro tio
indas
plian
kondolencon.
Mi scias :
malemas al nura frazar' vi,
hakas la kverkon por celo digna.
Kaj ni
ĉu ne saman metion rajtas havi,
Tornante de l' homaj kapoj la lignon ?

Nature—

Utile estas fiskapti,
eltreni la reton
plenan de sturgoj.
Sed la poeta ago ĉi kaj frapa
estas la sama :
la homojn kapti,
dronintajn en marĉo burĝa.
Ega labor' :
ardi super la karbo,
meti por hardo feraĵojn siblajn.
Ĉu ekzistas aĉul'
verdiktonta al ni la degradon ?
La cerbojn ni fajlas per lingva fajlil'.
Kaj kiu superas—ĉu la poeto
aŭ la teknikul'
kun utilo
gvidanta la homojn al bon' materia ?
Ambaŭ ni
estas por koroj la sama movil'.
Animo estas ja motor' genia
Ni samas,
kolegoj en vicoj amasaj,
proletoj de l'cerbo kaj korpo.
Nur kune
la mondon priornamos,

per marsreeĉaj akordoj.
 Nin sirmu ni varfe
 kontraŭ vortotempesto.
 Al agoj!
 Freŝnova labor' ne malestas!
 Kaj la oratorojn babilajn—
 al muelejoj,
 al muelistoj—
 por akvoparole turni la muelilojn!

Trad. N. Hohlov el „*Per Voĉo Plena*“

Funebra vespero

L. IVN

Estis vespero frosta.
 Bruis obtuze piedoj.
 Akre doloris ostoj.
 Pensoj malviglis tedaj.
 Iu subite diris
 Vortojn ĉagrene-plenan,
 Diris kaj tuj foriris,
 Restis nur: „Lenin, Lenin....“

Kiam la patro pereis
 (Lin sufokis laboro)
 Nur pro kolero mi tremis,
 Mankis al mi ploro.
 Kiam mian patrinon

Frostigis la Jaro Malvarma,
 Mi ne ellasis krion,
 Mankis al mi larmo.
 Kiam en densaj arbaroj
 Mi vagis, en neĝo dronante,
 Mi sentis: tra ĉiuj baroj
 Vidas la vojon Gvidanto.

Sed nun? Kaj miajn okulojn
 Brulvundis du gutoj larmaj.
 Sed nun? Kaj neĝan nebulon
 Pentris uzin'—alarma.

Mortis Vladimir Lenin
 —Flugis radi-ondaro—

Mortis Vladimir Lenin,
 Gvidanto de l' Proletaro.

For nacia retaro!
 Landlimojn ne konas doloro.
 Tra kontinentoj kaj maroj
 Fluas funebra sonoro.

Ne poru, ne ploru, ne ploru,
 Ne ploru pri kara Gvidanto.
 Ekploru per fajra oro
 Metalu en fornoj brulantaj.

Ni duobligu laboron!

Ni plifortigu impeton!
 Lenin!
 Ni ĉiuhore
 Plenumu viajn dekretojn.

Ruĝa standard' ardas
 Nia impet' aktivas.
 Lenin—
 nia standardo,
 Lenin
 por ĉiam vivas.

1905 (Moskvo)

N. Hohlov

Mi memoras: fenestroj flamantaj
 Sub la suno subira sangadis,
 Kaj la stratoj ebriaj pro kantoj,
 Al la ruĝa liber' serenadis.

Iu forta la brakojn muskolajn
 Disetendis por fojo unua
 Kaj eljetis malnovajn idolojn
 El la templo per bato forskua.....

Flirtis gaje skarlatataj rubandoj,
 Ĉron semis la suno vespera,

Kaj respondis al ĉies demandoj
Juna voĉo : libero, libero

Sed ekkrakis la pafoj—de kie?—
Ekbruegis eksplodoj tertremaj,
Kaj kun fajroj de l' kugloj, orgie,
Ĉien flugis malbenoj kaj ĝemoj.

Frenezige, la homoj sin ĵetis
Post la niĉojn, al strataj anguloj,
Puŝis en la tumulto, faletis,
Kun teruro en larĝaj okuloj.

Esperantisto, ekesto kaj malapero*

Rejmond Svarc

| | |
|---------------------|-----------------|
| Gazetartikolo | Entuziasmo ! |
| Aŭ varba parolo. | Samideano, |
| Favora impresio, | (Je via sano !) |
| Ekintereso. | Kamarado ! |
| Lernlibro, | Varbado, |
| Sankta vibro, | Instruo, |
| Propaganda miasmo : | En butontruo |
| | Verda flago, |

* Burĝa esperantisto が同種類の esp-isto の典型的な生活を笑って罵がつている。この satira poemo はわれわれから見れば burĝa esp-isto 自身の姿である。

Nova sento,
Facila vento,
Kaj poemo
Pri sama temo !
Post hezito
Delegito.
Laŭ bezono
Gazetabono,
Kotizoj
Kaj valizoj
Por kongreso.
Miraklimeso !
Fraka vesto,
Bala festo,
Naci-kostumo,

Gloro tago !
Plua ŝtupo
Nova grupo.
Amleteroj,
Amindumo.
Hispanino,
Korinklino
Kaj esperoj,
Mielo,
Ĉielo !
.....
.....
Edzinoj
FINO !!

Tagiĝas

Julio Baghij

Kiel sangstuka monstro en lukso parazita,
se prude grakas kun grimaco
al mizerul' pri justa graco,
tiel centdenta buŝo de mondo hipokrita
proklamojn vomas kun minaco
pri benoj de l' armita paco.

Kiu vin fidus strutostomaka malsatanto,